

Pola Esperantisto

XXX
JARO

OKTOBRO
1936

Esperantysta
Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — MGR. TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĜIS LA 20-a DE CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

La lastaj okazintaĵoj.

Esperantistoj sendube bone memoros, ke la voĉdonado de la delegitoj pri la ŝanĝo de la statuto kaj sekve la translokigo de la oficejo montris, ke 80% el tiuj, kiuj voĉdonis, aprobis la ŝanĝon. Pro tio, ĉiu atendis baldaŭan solvon de la problemoj kaj komencan de la vere necesa laboro de la centra oficejo.

Bedaŭrinde la svisaj protestintoj rifuzis akcepti la rezulton kaj ne ĉesigis la leĝan proceson, kiu malhelpas la translokigon kaj aldonas altajn kostojn al la jam suferanta budĝeto de nia organizo. Por pravigi tiun agon, ili prezentas ses kritikojn: — Oni sendis aerpoŝte bultenojn al kelkaj malproksimaj landoj; la cirkulero al la delegitoj estis subskribita de la prezidanto, sed ne de la Direktoro, ktp. Sed la unua kritiko estis, ke la Prezidanto ne formale voĉdonigis la Komitaton pri okazigo de la delegita voĉdonado. Tio estas vera, ĉar ekzistis jam antaŭ voĉdono de la Komitato por translokigo al Londono. Neniu bonvola homo pretendas, ke estis necese revoĉdonigi ĝin kaj malŝpari ankoraŭ kelkajn monatojn kun la koncernaj altaj elspezoj por nur formala aprobo de la delegita voĉdonado pri aliĝo de la statuto, kiu estas la sekvo de la aprobo jam donita. Kaj

kion tia dua voĉdono de la komitato estus ŝanĝinta en la rezultato?

Post la 4a de julio la Prezidanto traktis kun la protestintoj, kaj dum la unuaj tagoj de la Viena Kongreso ŝajne estis espero pri akordiĝo. Je la 14a de aŭgusto li ricevis leteron de S-ro Bouvier, kiu malaperigis tiun esperon kaj montris, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la proceson ĝis la fino. Laŭ la kalkulo de la Komitato tiu certe daŭrus minimume sep monatojn, kaj laŭ la advokato, eĉ pli ol unu jaron. U.E.A. ne plu posedas sufiĉe da mono por elteni dum tiom da tempo, ĉar intertempe ĝi povus preskaŭ nenion fari. La protestintoj per leĝa proceso malebligas la funkciadon en Londono, kaj ankaŭ malpermesas, ke la elektita Direktoro laboru en Genevo, dirante ke li estis elektita nur por Londono. Fakte, do, tio signifas la morton de U.E.A. Pro tio, la komitatoj en Vieno, kun granda bedaŭro, unuanime akceptis la ĉi-kunan rezolucion.

Post la kongreso la Prezidanto vizitis S-ron Stettler, kiu diris, ke li tute ne enmiksiĝis en la geneva proceso. Li vizitis S-ron Bouvier, kiu promesis paroli kun siaj amikoj, kaj doni respondon je la fino de aŭgusto. La respondo alvenis, kaj

denove montris, ke ili ne volas ĉesigi la proceson.

Tio montras, ke kelkaj malmultaj personoj tute ne volas akcepti la deziron de la granda plimulto, sed volas devigi la komitaton resti en Genevo, kvankam ĝi bone scias, ke tio estas finance neebla. La komitatanoj, opiniante ke forta

internacia organizo, kiu volas kaj povas labori en la intereso de la movado, estas pli grava ol iu nomo, decidis starigi novan organizon sub la nomo „Internacia Esperanto-Ligo“. Ili atendas la subtenon de ĉiu Esperantisto, kiu deziras unuecon kaj bonan laboron.

EKSIĜO DE P. E. D. EL U. E. A.

La Estraro de P.E.D. kune kun du membroj de la Cefkonsilantaro en la kunsido okazinta la 16. de oktobro 1936. akceptis unuanime jenan decidon:

1) Pollanda Esperanto-Delegitaro ekzigas el U.E.A. kaj aliĝas al Internacia Esperanto-Ligo (IEL) en Londono.

2) La supra decido estos komunikita per speciala cirkulero al ĉiuj organizoj apartenantaj al P.E.D., por ebligi al ili voĉdonadon por aŭ kontraŭ la ekzigado el U.E.A.

ESTRARO DE P.E.D.

RESPONDO AL LA ARTIKOLO „PROTESTO“

(nro aŭg. - sept. 1936, p. 110).

En tiu artikolo oni riproĉis al mi diversajn aferojn, rilatajn al la translokigo de UEA, kaj al mia sinteno kiel prezidanto de la laborkunsidoj dum la 28-a Kongreso, en Vieno.

Permesu, ke mi respondu per kelkaj vortoj.

Mi ne ripetos la motivojn — kiujn ĉiuj nun konas, kiuj devigis la gvidantojn de UEA proponi translokigon de UEA el Genevo al Londono. Mi nur atentigos pri grava forgeso de la aŭtoro de la artikolo: li ne parolas pri la voĉdonado de la Delegitoj, el kiuj 80% aprobis la ŝanĝon de la statuto kaj la translokigon al Londono. Oni do ne parolu pri rompo de la statuto, ktp.

Pri la elspezoj kiuj rezultos, (oni diras), el la translokigo, oni rimarku, ke tiu translokigo ne estus rompinta nian budĝeton, se kelkaj personoj ne estus procesintaj kontraŭ nin. Sed la esperantistoj ĝoŝos eksciante, ke anglaj bonfarantoj jam donacis domon apud Londono (preskaŭ en Londono mem), por instali nian sidejon. Jen bela ŝparo kiun ni faros ĉiujare, kaj kiu staros apud la aliaj, rezultantaj el nia decido.

Estas vere, ke kelkaj esperantistoj, kiuj bedaŭras tiun ŝanĝon, provis malhelpi la decidon de la Delegitoj kaj sin turnis al ĝeneva tribunalo. Mi ne insistos, kiel strange estas vidi esperantistojn petantaj, ke nacia tribunalo decidu kontraŭ voĉdonado de la esperantistaro.

Pri mia sinteno kiel prezidanto de la tri laborkunsidoj, ĉiuj ĉeestintoj scias, ke mi lasis la kontraŭulojn paroli libere dum

du trionoj de la tuta tempo de tiuj tri kunsidoj. Tamen fine devis proponi al la aŭdantaro, ke oni limigu la paroltempojn de ĉiu oratoro ĝis 5 minutoj, sed vane: ilia elokventeco ne estis modrigebla! Pro tio, al s-ro MALMGREN, kiu devis legi kaj diskuti interesan raporton pri la propagando, restis tempo por legi nur parton de tiu raporto, kaj neniu diskuto povis sekvi. Multaj ĉeestantoj estis forveturontaj je la dek-tria kaj duono ekskursante „Tra Aŭstrio“ per aŭtobuso; jam multaj eliris el la ĉambro. Mi do fermis la kunsidon nur kiam la tempo ne plu permesis daŭrigadon.

Mi ne kontestas, ke s-ro MEĎRKIEWICZ estis doninta voĉdonproponon antaŭe, sed ĉe la fino de la kongreso mi ne havis ĝin en la manoj, kaj oni ne trovis ĝin. Sed mi diru malkaŝe ke, eĉ se ni estus havinta tiun proponon, mi ne estus povinta voĉdonigi pri ĝi. Efektive, antaŭ unu monato, la voĉdonado de la delegitoj — nia plej alta instanco, krom la ĝenerala voĉdonado de ĉiuj aktivaj membroj — estis decidinta la translokigon. Eĉ se la kongreso — aŭ pli ĝuste la personoj restintaj en la ĉambro ĝis la lasta minuto — estus voĉdonintaj deziresprimon kontraŭan al tiu decido, la Komitato ne povis ŝanĝi sian vojon kaj devis obei al la Delegitaro.

Kion do faros la esperantistoj? Restas nur unu voĉo: ĉiuj samideanoj akceptu la decidon de la Delegitoj, ĉiuj forgesu la kelkfoje akrajn diskutojn: al ĉiuj ni ĝoje prezentos la manon.

L. Bastien.

LA SITUACIO

La esperantistoj estas informitaj pri starigo de Internacia Esperanto Ligo.

Kiel ĉiuj scias, la decido translokigi UEA en Londonon renkontis kontraŭstaron, ĉefe de svisaj samideanoj. Ili postulis, ke tiu gravega paŝo okazu en maniero tute laŭleĝa, t. e. per laŭstatuta voĉdonado de la delegitoj. Sekve de tiu postulo oni aranĝis voĉdonadon. Sed tiu voĉdonado ne estis ankoraŭ laŭ statuto.

La art. 58 de la statuto diras, ke por ŝanĝi la statuton (translokiĝo ekster Svisujon estas gravega ŝanĝo) estas necesa voĉdonado de la delegitoj. Sed iu ajn, eĉ la prezidanto, ne povas laŭ sia propra plaĉo kaj iniciato okazigi la voĉdonadon. Por tio estas necesa decido de la Komitato aŭ Estraro, aŭ iniciato de kvinono de la delegitoj. Do, por ke la voĉdonado estu laŭleĝa, sufiĉis, ke tiurilate decido de la Komitato aŭ Estraro, korpoj ne tre grandaj, estu formale akceptita. Tiu formala decido mankis, kaj pro tio oni plendas antaŭ la Tribunalo.

La Estraro de UEA diradis al ni: „Fidu al ni, ke ni ja volas, nur bonon de Esperanto“. Kaj neniu el ni permesis al si tion dubi. Sed same, kiel ni devas esti lojalaj al la ĝisnunaj gvidantoj de UEA, ni ŝuldas lojalecon kaj bonfidon al ĉiuj aliaj membroj de tiu Asocio. Ni devas do esti same lojalaj ankaŭ rilate al la svisaj samideanoj, kiujn oni nun emas prezenti kiel nigrajn ŝafojn. Ni devas kredi, ke ankaŭ ilian agadon diktas nur la zorgo pri la bono de nia afero.

UEA havas statuton. La statuto ne estas kreita por kuŝi en tirkesto. Oni devas ĝin obei. Tiu oboe ligas ne nur simplajn membrojn, sed ankaŭ la gvidantojn de la Asocio. Se en afero tiel grave, kiel foriro el Svisujo, la gvidantoj ne atentis la statuton, oni ne devas miri kaj surpriziĝi, se iuj protestas kontraŭ tiu malzorgo kaj postulas, ke ĉiu litero de la statuto estu respektata.

La gvidantoj povis eble, antaŭ ol aranĝi la voĉdonadon, esperi, ke la membroj ne insistos tro je la formaleco de la procedo. Sed kun la momento, kiam aŭdiĝis la unua protesta voĉo, tiu espero devis fali. Restis nur — aĝi precize laŭ la statuto.

Kelkaj emas kompreni la agadon de la svisaj samideanoj kiel nuran ĉikanadon. Ili diras: Eĉ se ni konformiĝus al

iliaj postuloj — kian garantion ni havas, ke ili tuj poste ne trovos novajn punktojn de atako kontraŭ ni? Saŭnas al mi, ke se oni volus senti ŝin tiurilate tute sekura por la estonteco, oni devus inviti reprezentanton de la protestintoj, ke li partoprenu kaj kontrolu la tutan procedadon. Falsa estus la ideo, ke tio povus malhonori la Asocion aŭ ties gvidantojn.

En la Nro I. de la Oficiala Bulteno de Internacia Esperanto Ligo ni legas, kiel pravigon pri la fondo de la nova Ligo, ke tiu formala laŭstatuta voĉdonado, kiun volas la svisoj, postulus „minimume tri monatojn kaj posttirus la koncernajn altajn elspezojn.“ Se ne — proceso, kiu povas daŭri eĉ jaron kaj kosti certe multege,

Sajnus nature, ke el la du alternativoj oni prefere elektu — la unuan. Sed tio ne okazis. Anstataŭ „malŝpari tri monatojn kaj la koncernajn altajn elspezojn“, oni konsideris, ke estos pli facile fari skismon en la movado.

Laŭ la decido de 9 (nur naŭ!) komitatanoj, „la landaj Asocioj, respektive la komitatanoj, estas petataj tuj ekŝigi el UEA kaj fondi novan Asocion“. Kaj se iuj Asocioj, komitatanoj aŭ delegitoj ne plenumos tiun peton kaj ne sekvos la gvidantojn sur la novan vojon? Tiam okazos civila milito en Esperantujo, komparebla eble nur kun la Ido-skuo en 1907.

Kaj tion ĉi oni povis eviti konformiĝante al la statuto. Por la prezo de nuraj „tri monatoj kaj la koncernaj altaj elspezoj“ oni povis eviti disrompon kaj konflikton, antaŭ kiujn ni nun staras, kaj kiuj certe daŭros pli longe kaj kostos pli multe. Kial oni ne faris tion? Kiuj motivoj diktis tiun danĝeran elekton? Ĉu eble nura spitemo kontraŭ la protestintoj? Ni legis, ke s-ro Bastien klopodis ĉe la protestintoj, ke ili ĉesigu la ruinigan proceson — kaj ili ne volis. Sed ni ne legis, kiuj estis tiuj venekblaj kaitoj, kiuj evidente ĝis tia grado malebligis okazigon de la laŭstatuta voĉdonado, ke oni preferis la disbaton, ol kontentigon de statutaj postuloj.

Mi akcentas, ke ne temas en tiu ĉi momento, ĉu UEA restu en Genevo aŭ iru en Londonon. Sed temas pri tio, ke gvidantoj de la movado trovis pli facilan elvoki skismon kun eble neantaŭvideblaj konsekvencoj, ol subiĝi al la statuto.

La gvidantoj petas, ke ni fidu al ili, kaj ni deziras fidi. Sed ni ne povas fidi blinde. La Asocioj, komitatanoj, delegitoj, la reprezentantoj, post kiuj staras la tuta popolo de UEA, ne povas sekvi blinde la alvokon, kiun ili povas kredi nura spito.

La reĝo mortis — vivu la reĝo? Sed la reĝo ne mortis ankoraŭ. Tro frue estas sonorigi funebrajn sonorilojn por UEA.

La statuto de UEA, sufiĉe strange, ne havas specialan ĉapitron pri dissolvo de la Asocio. Nur en la art. 57 ni legas, ke dissolvi la Asociion povas ĝenerala voĉdonado de ĉiuj aktivaj membroj. Sed okazigi tiam voĉdonadon estas ja eĉ pli komplike, ol rearanĝi la regulan voĉdonadon de la delegitoj. Aliflanke, asocioj ordinare dissolviĝas, se ili ne havas plu membrojn. Sed ke UEA restu eĉ sen tri membroj — tio ja ne okazos facile. Se la estraro kaj kelkaj komitatanoj foriros, oni elektos aliajn. Se kelkaj Asocioj foriros — restos aliaj, aŭ eble oni denove reformos la statuton, por doni al la esperantisto pli grandan eblecon aparteni al UEA ekster la landaj Asocioj. De la proceso UEA liberiĝos aŭ per formala adaptiĝo al la statuto, aŭ simple, rezignante forlasi Svisujon, kie pro la mallaltiĝo de la svisa franko la situacio iĝas pli favora. Malgrandiĝas la valoro de la luopago, impostoj, oficistaj salajroj, kaj eĉ de la ŝuldoj. Se la svisa mono malal-

tiĝus antaŭ la Pasko, certe la propono pri translokiĝo trovus malpli da simpaticiuloj.

Gvidantoj de UEA foriras. En la nova Asocio ili okupos analogiajn postenojn. Sed kiam garantiĝon ili doŝos al siaj membroj, ke ili respektos la novan Asociion kaj ties statuton, se evidente tiel malfacila ili trovis respekti tiun de UEA?

Oni diras al ni, ke temas nur pri nova nomo. „La korpon, la kapon, la koron kaj la animon ni restarigos, nur sub alia nomo, en Britlando“. Restos tamen ĉe la Lemano la laroj kaj penatoj de UEA. Restos en Genevo la tradicio, la materialo, la dokumentaro pri la preskaŭ tridekjara agado de la Asocio. Restos fine en Genevo la biblioteko de UEA, kiun la svisa Tribunalulo ne permesos forporti.

Okazis en 1907, ke la esperanta popolo restis „armeo sen ĉefoj“, ĉar la ĉefoj transiris en la Ido-tendaron. Kaj la senĉefa armeo venkis la senarmeajn ĉefojn.

Okazis en 1932, ke naskiĝis en Parizo UFE — kaj nelonge ĝi vivis, ĉar venkis la solidareca sento de la esperantistoj kaj la kompreno, ke nur en unueco estas nia forto. Ĉu ni ne esperu, ke ankaŭ nun ni evitos la dramon de la disfalo, ke venkos la sento de Unueco?

Lidja Zamenhof.

Nafanala

NIA STELETO.

dediĉita al Dro A. Gurvicz.

Terura, senlima, malluma nubego vastiĝis flugilojn sur ter'.
Estingiĝis la stelojn, kaj forte ekregis mallumo sen fin', sen esper'.

La homoj forĝesis pri amo, frateco, batalas sovaĝe sur ter'.
Nun fluas senfine la larmoj kaj sango, kaj ĝemas homar'. pro sufer'.

Sed brilas senĉese modesta steleto vokante al am' kaj liber',
kaj pelos mallumon, per helaj radioj la verda stelet' de esper'.

I. BUNIN.

MORFEO.

Min ravas via kron', papava ruĝ-purpuro,
Ho vi, mistera gast', loĝanto de l' obskuro.
Jen palas la vizaĝ', malĝajas la rigard',
Fiksiĝita nun sur min kun milde flama ard',
Timiĝas nin Morfe' per sia hor' sensona.

Sed floras en mallum' kun sorĉa flam'
burĝona
La dia florokron' kaj gvidas for ĝi min
Al ĝojoplana land', alloŝa por anim',
Forestas tie bar' por la esper' malnova,
Ka' sonĝ-imagas min mi fora, ĉiupova,
Kaj ne miriĝas plu eĉ la kares' de ŝi,
Kun kiu min per mort' disigiĝis jam Di'.
El la rusa: Hilda Dresden.

JUBILEO DE BAGHY KAJ KALOCSAY

En ĉi tiu aŭtuno pasos dudek kvin jaroj, de kiam la du plej grandaj poetoj de nia literaturo: Julio Baghy kaj Koloman Kalocsay, komencis sian laboron por Esperanto.

Interese koincidas kelkaj gravaj datoj en la vivo de niaj du gvidantaj poetoj: ili naskiĝis en la sama jaro: 1911, ili same estas hungaroj kaj same en Budapeŝto ili grupiĝas ĉirkaŭ si la modernan skolon de la esperanta literaturo. Ludo de la hazardo. Esence kiom da diferencoj koncerne verkislan profilon, labortereno, legantlar-tavolon... Sed malgraŭ la diferencoj, kun kia egale hela lumo brilas sur la firmamento de nia lingvo tiu ĉi ĝemela ŝteloparo, kies malsamspeca radiado ne malhelpas, eĉ fortigas la brilon unu de la alia kaj sorĉas antaŭ niaj okuloj tian diboĉan fajroludadon, ke apenaŭ ni kapablas malfermi la okulojn tiel kulturetimigintajn al la modestaj meĉoj de nia malriĉa ĉielo...

En la siberiaj militkaptitejoj komenciĝis la eksterordinara esperantista kariero de **Julio Baghy**: tie li gvidis kurson por diversnaciaj, tie vundiĝis por ĉiam lia sentema, justo-serĉanta animo pro la terurajoj de la bestiganta homo, tie formiĝis en li lia filozofio, kiun li volis fari savilo ĝuste kontraŭ tiu bestigo, kaj tie li travivis kun elementa forto la internan ideon, tiun ĉi ĉefmotoron de ĉia Baghy-a verkado ka' ago... Poste li revenis al la patrujo kaj intense partoprenis en la postmilita movado, gvidis kursojn, formis grupon, aranĝis literaturan vespercon k. t. p. Kaj venis la internacia labortereno: universala kongresoj, kiujn li partoprenis aktive kaj al kies spirita nivelo li signife kontribuis, kaj la rondinstruado Cseh-metoda, dum kiu li pruviĝis unu el niaj plej talentaj instruistoj. Instruisto, kiu ne kontentiĝas per la strikta prezento de la lernomaterialo, instruisto, kiun neniam formuloj kapablas kateni. Instruisto, kies disĉiploj ne forlasis la movadon, sed restas fidelaj eĉ post jaroj, ĉar vivas en iliaj koroj kun flagranta flamo la sankta fajro, kiun ekbuliĝis ilia instruanto.

El ĉi tiu tre multflanka laboro rezultis, ke Baghy atingis ĉion atingeblan, kion tre malmultaj verkistoj atingas jam en sia vivo: li estas la plej populara homo en nia movado kaj liaj portretoj pendas tiom ofte en la klubejoj kiom ofte

nur tiuj de Zamenhof kaj pastro Cseh, kaj samtempe li atingis la plej altan oficialan rekonon, fariĝinte am antaŭ jaroj membro de la Esperantista Akademio.

Se iu pelus min, ke mi koncede klarigu al li, kio ja estas tiu Baghy-a filozofio, pri kiu oni povas legi tie kaj ĉi tie, en recenzioj, studoj, foje por, foje kontraŭ: ja mi ne povus alie respondi: la interna ideo. Jes ja, ĝi estas la esenca tra to de la homa kaj verkisla sinteno de Baghy, ĝin li glorigas per sia por-esperanta agado, ĝin li enportigas pere de siaj verkoj, kiuj humile, sed klarencie portas sur si la devizon: „AMO KREAS PACON, PACO KONSERVAS HOMECON, HOMECO ESTAS PLEJ ALTA IDEALISMO". Jes ja, tiu ĉi filozofio eble ŝajnas tro idealista, tro malfirm baza, por nia sange reala epoko, ja aŭdiĝis voĉoj kritikaj, kiuj esprimis sian dubon pri la aktualeco de tia filozofio, sed ni konfesu sincere, ĉu la Baghya filozofio kulpas? Aŭ eble la epoko?! Kaj ĉu ne ĝuste tia simpla elementa kredo, tia mond-rigardo iom naiva, (ni ne timu la vorton; trafulmas mian kapon la naiveco de Sankta Johano en la Shaw-teatraĵo) estas eble tio, kio plej mankas al nia generacio, tiel blinde rapidanta al la abismo?

La granda literaturhistoria signifo de la Baghy-verkaro konsistas en tio, ke per sia ekzisto ĝi pruvis la kapablecon de Esperanto por originala literaturo. Jes, estis ja antaŭ lia apero originalaj romanoj kaj originalaj versoj kaj estis unuopaj esperantistoj, kiuj ilin legis, kelkaj poemoj de Zamenhof kaj Grabowski iĝis jam komunaj trezoroj de la Esperantistaro, sed Baghy unua kapablis krei ĉirkaŭ si legantan publikon, jam ne plu unuopulon, sed publikon en la vera senco de la vorto, legantojn, kiuj ne nur legas la libron, sed parolas pri ĝi, komentas ĝin; jes, Baghy alportis la novaĵon: la apero de Esperanta libro estas socia evento. Kaj li faris ankoraŭ plian miraklon: versoj ĝenerale ne estas vaste popularaj, krom la Zamenhof-poemoj, kiuj ja iĝis por la esperantistaro pli ol simplaj poemoj, akirinte la rangon kaj rolon de religiaj himnoj. Sed krom ili kaj eble kelkaj versoj de aliaj aŭtoroj, la esperantlingvaj poemoj ne vekis laŭtan resonadon. Nun venis la Baghy-poemoj kaj ilia dolĉa muziko, ilia facilalta ritmado, ilia fortmuskola impelo enfrapas sin en

la orelojn kaj korojn de la esperanta publiko. De tiam la esperanta verso estas afero ne nur de la poetoj kaj recenzantoj.

Ankaŭ kiel satira prozisto li estas vojrompanto sur tiu ĉi tereno; li verkis lirikajn ĉapitrojn en sia granda romano **Hura** kaj recipe estas lia korinfano la ruze mallerta, ĉarma figuro de Mihok, heroo de bonegaj Baghy-noveloj kiu estas aparte sukcesa vivanta kreaĵo de Baghy, kvazaŭ vivanta persono el nia malgranda Esperanta mondo.

Nepridiskuteblaj estas la meritoj de Baghy, ĉirkaŭ la antaŭpreparo de la venonta esperanta dramo. Li mem verkis teatraĵojn; en ili kaj en tiuj de aliaj aŭtoroj li aktoris kun granda sukceso; kaj kiel reĝisoro li faris miraklojn: el kelkaj bonvolaj, inteligentaj, sed neniel faksportaj amatroj li ellogis tiel brilajn prezentadojn, ke, trankvile ni povas diri li atingis la maksimumon, kiun oni povas atingi. Kaj li semis grainon, kiun la estonto rikoltos...

Dr. med. ĉefkuracisto en hospitalo por infektaj malsanuloj, docento ĉe la budapeŝta Universitato, post la milito aktiva partoprenanto en la Esperanto-movado, gvidinto de kursoj, ĉefredaktoro de Literatura Mondo en ambaŭ periodoj ĝis nun, verkanto de sinsekvaj aperantaj libroj; jen la eksteraj datoj el la vivo de tiu granda Esperantisto kaj granda homo, kiun ni konas sub la nomo de Kolo-manĝ Kalocsay.

Per verstradukoj li komencis sian verkistan karieron kaj ankaŭ nun se la orelojn de Esperantisto ekfrapas lia nomo, tuj venas en la kapon memorbildo pri iu el liaj majstraj traduklibroj. Kaj vere, la Kalocsav-tradukoj surhavas ian individue karakterizan stampon, kiu ne nur mankis en ĉiuj tradukaĵoj, aperinta antaŭ li, sed kiu levas liajn tradukojn alte super la ĝustiaman akiraĵon de la Esperanta literaturo. Kio estas la sekreto de liaj tradukoj? Bonajn tradukojn ni ja trovas antaŭ li, sed la ĉefa kaj plejparte la sola gajnaĵo de tiuj tradukoj estis la **forma solvo**. La lingvo ankoraŭ ne estis ellaborita kaj la tuta energio de la tradukanto eldierpiĝis en la serĉo de forma solvo, por io plia ne plu restis forto. La esenca supereco de Kalocsav kuŝas tie, ke la perfektecon de la formo li levis tiel alten, ke la forma solvo por li ne plu estas problemo, do li havas energion por transplanti ankaŭ la humoron, individuan guston de la tradukota ver-

ko kun ĉiuj ĝiaj nuancoj, koloroj. Jes Kalocsay estas kreanta ĝardenisto, kion li transplantas, tio enradikiĝas en la Esperanta humo kaj ekfloras je mirinda nova vivo, kelkfoje la nova vivo radias pli riĉan brilon ol la originalo. Vivanta voĉo parolas el tiuj ĉi libroj, nenie aŭdiĝas la raŭka knarsono de artefariteco, nenie tramalsekiĝas postsignoj de ŝvitado en laboro. Tre simpla estas la sekreto de tiu ĉi nova tradukarto. En la tradukita verso Esperanta la lingvo la unuan fojon ĉi tie vekigiĝis je vivo. Tia eksteraordinara rezulto ne povis resti sen vastefikaj sekvadoj. Kalocsay ne apartenas al la tipo de memcentra, memrigardanta artisto, kiu eble naskas artverkon sed de kiu neniu povas lerni ion; ne, Kalocsay donis ne nur ekzemplon, li faris pli: li konsciiĝis en si mem sian labormetodon kaj cedis ĝin al komuna trezoro. Tio klariĝas, ke lia traduko portis kun si ĝeneralan ekfloron de la Esperanta verstraduko: de tago al tago aperas novaj junaj talentoj; eldoniĝas Antologioj, kiuj en inda kvanto kaj artnivelo prezentas la poezion de iu nacia literaturo. Kaj ĉio ĉi ne estis imagebla antaŭ la eklaboro de tiu ĉi perfekta artisto kaj certmana edukanto.

La signifo de la originala poezio de Kalocsay kuŝas en tio, ke ĝi unue levis la Esperantan poemon egalranga al iu de la elitaj naciaj literaturoj. Unue ni sentis, ke la modesta rivareto de la Esperanta poezio kontaktiĝis kun la ĝenerala fluo de la eŭropa liriko. Komence de la plej sekrete delikataj animvibradoj, de la plej embuskaj subkonsciaĵoj, de la plej veluraj humornuancoj, de la plej petoleme ĉarmaj amoludoj ĝis la tragika malheligo de mondproblemoj, ĝis la katastrofa haosiĝo de individuaj kaj kolektivaj sortoj, ĝis la fine tamen venkespera volo de la homo de l' estonto; jen problemoj sentoj, humoroj de moderna homo, kiuj en Esperanto unue eklaŭtis sur la bronzo sonanta de Kalocsay!

Erarus tiu, kiu pensus, ke la lingvisto estas ia aparta homo en Kalocsay. Ke la poeto kaj scienculo estas apartaj personoj. Ne, lia okupiĝo pri la lingvista flanko de la movado estas nur afproksimiĝo al la sama celo, el alia flanko. La celo: vivo de la lingvo kaj ĝia evoluigo al tia nivelo, ke ĝi estu kapabla esprimi ĉion, kion homaj cerbo kaj koro diktas, jes, li celas fari la lingvon

inda ilo por la homaro, strebanta alten. Li rekonis, ke por fari altnivelan literaturon, ne sufiĉas la dekse reguloj kaj la trunka vortaro de la fundamento: estas bezonataj nuancoj kaj en la vortoj (neologismoj) kaj en la sintakso. Humile kaj kun fera volo li sin ĵetis al studado de la ekzistanta lingvo-materialo, ĉefe al la verkoj de Zamenhof kaj la rezulton de sia laborego li transdonas al ni en la Plena Gramatiko kaj en siaj lingvistikaj artikoloj. Kaj al la leganto malkovriĝis tute nova mondo: neniam ankoraŭ aperis al ni Esperanto en formo tiel muskola, tiel vivoŝvela, kiel en la verkoj de la plej ĝenia malkovranto de ĝiaj leĝoj.

La redaktora seĝo portis al Kalocsay multegan laboron, sed lia redaktoreco portis al la Esperanta literaturo multegan benon. Lia bonvola reviziado, liaj ĉiam modeste prezentitaj valoregaj konsiloj, helpis al multaj talentaj samideanoj; lia pasio al malkovro de novaj talentoj konatigis multajn novulojn al la publiko, lia fantazio riĉa je ideoj, lia laciĝebla instigemo al laboro jam naski-

ĝis multajn librojn, artikolojn... Kaj certe oni jam rimarkis, ke Kalocsay havas ian propran manieron de korektado: ankaŭ sur tiu ĉi tereno li sekvas la principon de neceso kaj sufiĉo, nome li korektas nur la nepre necesajn, sed lasas validiĝi la individuajn stilon de la korektito.

Multaj imagas Kalocsay'n kiel nuran literaturiston, kĵun la movada parto de Esperanto ne multe interesas. Eraro! La movado interesas lin same, kiel la literaturo. Li rekonis, ke Esperanto nur helpe de sia literaturo povas ĝisatendi sian ĝeneraligon, ke la estonto de la lingvo baziĝas sur ĝia literaturo, tial li akcentas ĝian gravecon. Por li la literaturo ne estas io memcela, kiel ankaŭ la lingvo ne estas memcela: en lia mondkoncepto ambaŭ servas la venontan pli perfektan homon.

Ni deziru al niaj jubileantoj, ke la fruktoplajn dudek kvin jarojn sekvu ankoraŭ multaj-multaj jaroj plenaj de sano kaj sukcesa laboro.

L. Totsche.

DR. LEOPOLD DREHER

Gaborprogramo de PĔD por 1936-1937

Komisiite de VII. Tutpollanda Kongreso de Esperanto, ellabori por la tempo ĝis la Jubilea Kongreso de Esperanto specialan laborprogramon de pollandaj esperantistoj, mi prezentas ĝin laŭsekve;

Art. 1. — Laŭ decido de la VII. Tutpollanda en la tuta lando estos aranĝataj solenaĵoj por honori la 25-jaran jubileon de la esperantista agado de prof. Dro Odo Bujwid. Ili formas apartan punkton en la laborprogramo, tamen nedisigeble ligitan kun la tuta jara laboro. Ili devas nepre okazi en la jaro 1936, kiel la jaro, en kiu pasas 25 jaroj depost la momento en kiu aktive ekagis la estimeginda jubileulo por nia kara afero.

La festaranĝoj konsistas el solenaj festvesperoj, kiuj okazos almenaŭ unu fojon en ĉiu urbo; krom laŭvola temo de la festvesperoj deviga estas a) unu festparolado honoranta la agadon de la Jubileulo, b) festkajero esprimanta dankesentojn de la lokaj esperantistoj al la Jubileulo kaj enhavanta iliajn man-subskribojn, sendota al la Jubileulo el ĉiu urbo aparte. La nomoj de la subskribintoj devas esti klare legeblaj kaj alhavi adresojn detalajn po ke — kun la permeso

de la Jubileulo — ili povu formi materialon por adresaro de pollandaj esperantistoj, kiun preparolas art. 4.

Art. 2. — Krom laŭvola labormaniero, ĉiu grupo esperantista disvolvas agadon propagandan por la Jubilea Kongreso de Esperanto 1937, okazonta en Varsovio.

Tiacele ĝi, laŭ sia postulo, ricevas de la L. K. K. aŭ de la Estraro de P. E. D. la oficialan bultenon de L. K. K. kaj aliajn informojn pri preparlaboroj de L. K. K.

L. K. K. akceptas en unu el siaj ordinaraj kunsidoj konforman decidon pri ĝustatempa informado al la esperantistaj grupoj en Polujo per t. n. enlandaj informbultenoj, t. e. destinitaj speciale por Polujo. La grupoj klopodas pri enpensiĝo de la enlandaj informajoj en la loka gazetaro helpe de speciala esperantista ĵurnaliato, laŭeble ano de la loka grupo (gazetara servo).

La lokaj grupoj aranĝas komence de 1937 almenaŭ po unu propagandan publikan kunvenon kun la celo propagandi amasan vizitadon al la Jubilea Kongreso en Warszawa laŭ rabatitaj veturbiletoj (propagandaj kunvenoj).

La lokaj grupoj klopodas pri disgluo de la kongresaj senpagaj afiŝoj en videblaj lokaj (afiŝoj pri la Jubilea).

Art. 3. — Por ebligi amasan vizitadon al la Jubilea, pri kiu estas parolite art. 2., la lokaj grupoj aranĝas ne nur en la vintraj monatoj, sed ankaŭ senpere antaŭ la Jubilea specialajn kursojn de Esperanto por personoj, kiuj deziras ĉe esti la Jubilean.

La Estraro de P. E. D. sendas al la grupoj specialajn artajn afiŝojn, kiuj anoncas kurson gvidotan okaze de la Jubilea. La prezo de la afiŝoj estos, pro la granda nombro de la presajtoj, tre malalta.

Art. 4. — La Estraro de P. E. D. klopodas ke la Red. de la Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj eldonu la 1-an de jun. 1937 novan kajeron de la Bulteno, kies numero unua aperis en Julio 1935.

Art. 5. — La eldonantoj de Pola Esp. „zorgas. ke aperu en la monato junio 1937 speciala” dulingva numero dediĉita al la Jubilea kaj ties propagando. La numero estas senpage sendota al ĉiuj pollandaj gazetelegoj publikaj kaj al ĉiuj pollandaj redakcioj.

Art. 6. — La grupoj estas morale devigitaj klopodi, ke la Jubilean aliĝu kiel eble plej multaj personoj.

La grupo, kiu sukcesos sendi al la Jubilea la plej grandan (relative) nombron de partoprenantoj, akiros la „pokalon de pollandaj esperantistoj” por 1937.

La kriterio de la sukceso estas la distanco de la konkuranta loko ĝis Varsovio kaj la nombro de la loĝantoj de la konkuranta loko.

Art. 7. — Laŭ interkonsento farota kun LKK kaj kun IEL, la grupo, kiu sendas minimume 50 aliĝojn al la Jubilea samtempe, akiras la rajton enkasigi duonon de la kotiza mono por si mem, resp. redoni ĝin al postulantoj, kiuj apartenas al la 50-o da partoprenantoj, tiel ke ili efektive rajtas pagi nur duonan kotizon, pere de la grupsekretario.

Art. 8. — Varsovio kaj ties grupoj ne partoprenas la privilegion cititan en art. 6. kaj 7.

KLARIGOJ.

Pri art. 1. — Pri la tuta laborprogramo kaj speciale pri art. 1. m interparolis, okaze de mia restado en Bialystok la 23-an kaj 24-an de junio k. j., kun la prezidinto de la VII. s-ano Ŝapiro, membro de la Komitato por honori la 25-jaran jubileon de prof. Bujwid. S-ano Ŝapiro sugestis pri punkto 'b) de art. jenon: la apartaj festkajeroj estas sendotaj de la grupsekretarioj al la sekretario de la Komitato por honori la 25-jaran jubileon de prof. Bujwid, kiu sekretario loĝante en Kraków, klopodos, ke en Kraków okazu en decembro 1936 impona jubilea festvespero: la diversurbaj festkajeroj estos enmanigataj ĉe tiu Krakova festvespero al la Jubileulo.

Sekve, la festvesperoj en ĉiuj urboj devas okazi en novembro 1936, kaj la festkajeroj estas sendotaj al Kraków (la adreso de la sekretario estos komunikita en „P. E.” en la numero aŭgusta) plej malfrue la 1-an de dec. 1936.

Pri art. 4. En la novan kajeron de la Adreslibro estas metotaj ankaŭ la nomoj de esperantistoj, sed nur de tiuj kiuj sukcese finis esp. kurson, aŭ kiuj, lerninte sen instruisto, akiris ateston pri sciado de Esperanto.

Pri art. 5. — Estas kompreneble, ke la speciala numero de „P. E.” devas porti speciale belan veston kaj esti presata sur bona papero kaj per iom pli grandaj literoj.

Pri art. 8. — La nepartopreno de Varsovio en la konkurado estas komprenebla el la senco de la konkurado, kiu konsistas en aliro de kiel eble plej multaj vojaĝantoj al Varsovio mem. La „pokalo de pollandaj esperantistoj” tamen povas transiri al iu el Varsoviaj esp. grupoj en unu el la jaroj postsekvontaj la Jubilean Kongreson. Ĉar la laborprogramo 1936—1937 estas konsiderata kiel la unua en la serio de laborprogramoj 2-jaraj poste precize ellaborotaj laŭ ekzemplo de Britoj, Svedoj kaj aliaj.

(Rim. de la Red. Ni timas, ĉu la projekto pri honorado de prof. Dro Bujwid povos esti realigita pro fervojaĝo de la jubileulo).

25 JAROJ DE ESPERANTO

En la tempo, kiam la movado esperantista travivas sensimilan krizon, kiam ĉiutage la gazetoj anoncas pri la morto de plej malnovaj fideluloj, pri la forlaso, forigo de plej esperiĝaj kolonoj, kiam tutaj landoj forfalas de nia procesio — kiam eĉ en la korojn de la persistemaj kaj restintaj fideluloj komencas enŝteliĝi du-

bo — en tia momento, kiel kare kiel dolĉe estas konstati ke niaj vicoj ankoraŭ malproksimaj estas de malpleneo. Ke ankoraŭ restis tamen neforigebluloj. Ke estas homoj, kiuj sukcesis la ekzamenon de senlaca persistemo.

Jakobo Ŝapiro! Kiu tiujn du vortojn ne konas — tiu ne rajtas sin nomi Espe-

rantisto. Jen vera samideano! E-isto, kiu ne lasas pri si forgesi. Ĉar efektive, ne pasas ia tempo sen tio, ke lia nomo ne elnaĝadu. Kiom longe mi tiun nomon konas, mi ne povas al mi memorigi ian pli longan temp-periodon, dum kiu lia nomo ne elnaĝadu.

Kaj konas mi Joŝon (ĉiaman „Babilulon“) jam pli ol longe.

Mj memoras la unuajn tempojn, kiam mi lin ekkonis. Tio estis dum la germana okupacio. Ĉu la esperantista movado tiam ekzistis? Pli juste estas nomi tiun ekziston vegetado. Sur la fingroj de unu mano oni povus kalkuli la tiam agemajn samideano'n en Polujo. Kaj inter tiuj malmultaj okupis unu el plej videblaj lokoj Sapiro. Kaj ĝuste tiam estis Łódź (li loĝis tiam en Łódź) kiu fieris pro pleja agemo en Esperantujo (se ne tutmonda, do almenaŭ pollanda)... Baldaŭ poste Sapiro transveturas al Białystok. Kaj nun ni ree renkontiĝas kun ia „koincido“: ĝuste tiam estis Białystok, kiu rajtis fieri, kiel plej agema esperanta urbo en Polujo. Kaj estis ĝuste tiuj du urboj, kie unue aperis stratsildetoj kun surskriboj: Zamenhofa. Ekde la tempo, kiam Sapiro por konstante ekloĝis en Białystok, ni

vidas en tiu urbo, krom la Zamenhofstrato, ankaŭ gvidfolion, esperantan tekston en la oficiale de la urbestro eldonita pola gvidlibro, ni ricevas, danke al la senlacaĵ penadoj de tiu fervorulo, multajn oficialajn materialojn, dokumentojn, koncertantajn ĉu Zamenhofon, ĉu Esperanton. Fine (fino kronas la verkon) ni vidas Ŝapiron sur foto, kie li enskribiĝas en oran libron, dum plej solena ceremonio: fundamento por monumento al Zamenhof en plej honora loko de la urbo.

Nemencieblaj estas ĉiuj meritoj de tiu neelĉerpiĝulo (sciivoluloj havas la eblon ekkoni iom pri lia agado en la Enciklopedio de Esperanto). Ĉi loke mi plej ĝoje kaj kun plej pura konscienco volas proponi, ke en la esperanta movado ekzistu ordeno: „por la merito“.

Kaj se la ĉef-instancoj de nia Movado akceptus tiun proponon, do inter la unuaj nomoj de la listo de l' dekoraciotoj, klare vidiĝu la vortoj Jakobo SAPIRO.

Okaze de la argenta jubileo de via edziĝo kun Esperanto, akceptu, kara Amiko, plej korajn salutojn kaj gratulojn de via sincera.

Edvardo Wiesenfeld L. K.

SOLENA JUBILEO OKAZE DE DEKJARA LABORA AGADO DE SILEZIA VOJEVODO DRO MICHAŁ GRAŻYŃSKI

Nur malmultaj homoj ludis en Polujo en la rekonstruo de la Patruo tiel gravan rolon, kiel la silezia vojevodo dro Michał Grażyński, kiu festis en la lastaj tagoj de septembro 1936. sian dekjaran jubileon sur tiu respondeca posteno.

Kun kia entuziasma aprobo de la longjara meritplena agado akceptis la socio la sciigon pri la jubileo de dro Grażyński, pruvas la fakto, ke okaze de tiu festo ĉiuj komunumoj de la granda vojevoja distrikto sendepende de la partia aŭ nacia aparteneco de la komunumaj konsilantoj eknomis dron Grażyński unuvoĉe sia honora civitano.

Kun nekomparebla energio ekkomencis dro Grażyński antaŭ dek jaroj en la tempo de ĝenerala politika faoso kaj granda eksterlanda agitado kontraŭ la apartenado de Silezio al Polujo sian laboron sur la grava posteno kaj kun grandintencaj celoj por la estonteco li el-laboris politikan kaj ekonomian planon, kiujn li decidis plenumi kun neŝancelebla kaj nelaciĝebla fervoro kaj kiujn li ne

lasis malgraŭ forta kontraŭagado.

Laŭ politika vidpunkto ĉiam respektante la rajtojn de naciaj minoritoj, li klopodis organizi sian planon liamanierre, ke li entuziasmigis ĉiujn fervorulojn por efika agado kaj neniu sukcesis lin malhelpi per maljustaj atakoj en lia difinita celo. Laŭ ekonomia vidpunkto li ankaŭ sukcesis plenumi sian planon koncerne al rekonstruo de sia distrikto, kaj tiu post dek jaroj brile realigita plano rikoltis nun belajn fruktojn. Malgraŭ la krizo kaj ankaŭ politika kontraŭagado reviviĝis la silezia industrio post sia minaca falo kaj ĝi povas hodiaŭ konkuri kun plej grandaj industriaj centroj de la mondo.

Menciinda estas la brila agado de dro Grażyński sur kampo de konstruado de stratcoj kaj novaj fervojoj. En tiu direkto povas lia fervora laboro servi kiel modelo ne nur al aliaj provincoj de Polujo, sed ankaŭ al eksterlando.

Koncerne al publika klereco li substrekis antaŭ dek jaroj sian rolon sur tiu

grava agadkampo tiamaniere, ke la pola lernejo devas fariĝi centro de nacia agado kaj la problemoj de la pola lernejo devas esti plene solvita konforme al intereso de pola nacio. Kaj tiu plano grandioze sukcesis.

Dro Grażyński estas ankaŭ prezidanto de polaj skoloj kaj li solvis la skoltan problemon en tiu direkto, ke li suk-

cesis interkonsentigi la nacian ideon kun internacia skolta agado. Li fondis ankaŭ profilaktikan malsanulejon kun mil litoj por tuberkulozaj infanoj en Izdebnia.

Tiu granda civitano meritas, ke lia nomo brilu en la Ora Libro de rekonstruintoj de Polujo kiel modelo de unu el la plej meritplenaj patriotoj.

Nusia Bertig-Datnerowa.

ESPERANCKA GRAMATYKA

Ŝercik sceniczy — przeznaczony na wieczory propagandowe — rocznice itp.

Sala szkolna. Poszczególne końcówki i formy gramatyczne winne być narysowane na kartonie — w odpowiednich momentach nauczycielka bierze je kolejno ze stołu, by pokazać dzieciom.

Osoby:

Nauczycielka.

Dzieci.

N. Cicho dzieci! Dzisiaj w szkole Ścisłe — krótko — choć powoli
Nim wieczorne błyszczą zorze —
Wnet zasady wam wyłożę —
Wobec znacznej tej publikacji —
Esperanckiej gramatyki.
A więc śmiećcie się!

D. Ha! ha!

N. Jeden jest rodzajnik „la”
I na wszystkie się nadaje
Liczyby, przypadki, rodzaje.

D. (zdziwione na wesoło)
I na wszystkie się nadaje
Liczyby, przypadki, rodzaje?

N. (potakuje)
Rzeczowniki: „kto” — i „co”
Wszystkie kończą się na „o”
W liczbie mnogiej zaś — ojoj!
Zapłakane mają „oj”

D. (płaczliwie)
W liczbie mnogiej zaś „ojoj”
Zapłakane mają „oj”!

N. Któżby nie znał przymiotnika?
Czy męczyzna — czy podwika,
Czy odnośnie „ten” czy „ta”
Wszystkie kończą się na...

D. (kończąc) „...a”!

N. Liczebników małe grona —
Starczą jednak do miliona —
(pokazuje)
Unu — du — tri — kvar — kvin — ses
Sep — ok — naŭ — dek. Więcej chcesz?
Miłych zasię zaznasz chwil,
Kiedy wygrasz choć: centmil —

I to nie mniej — ani więcej!
Cent: sto znaczy — tysięcy: mil,
Razem: centmil: sto tysięcy!

D. Cent mil znaczy sto tysięcy!
(pokazuje na sobie i dzieciach)

N. Teraz zaś zaimki ci powiem:

mi, ci, li, ŝi, ĝi.

D. (pokazują również)
— Mi — ci — li — ŝi — ĝi.

N. Liczbę mnogą znasz w tej chwili
Już na pamięć: ni — vi — ili.

D. W liczbie mnogiej: ni, vi, ili.
N. Teraz zaś największa sztuka.

By nie poszła w las nauka,
Czeka was tu form bez liku
Przy odmianie... czasowników.
Powtarzajcie ze mną wraz:

Terażniejszy zawsze czas
Piękną ma końcówkę „as”.

D. Terażniejszy zawsze czas
Piękną ma końcówkę „as”.

N. A zaś przeszły — chytry lis
Mówi gramatyczki spis
Ma końcówkę śmieszna „is”...

D. Mówi gramatyczki spis
Ma końcówkę śmieszna „is”!

N. Teraz powtarzajcie w głos:
Że czas przyszły — zrzadził los
Kończy się jak nos — na „os”.

D. Że czas przyszły — zrzadził los
Kończy się jak nos — na „os”!

N. Nowa forma myśl zaprzęta,
Imiesłowy weźmy z kąta,
Czynne: inta, anta, onta.

D. Czynne: inta, anta, onta!

N. A zaś bierne — działwo złota,
Całkiem łatwa już robota!
Piszcie: ita — ata — ota!

D. Bierne: ita, ata, ota!

N. Pędź co sił! Goń, pędź co tchu!
Nie chodź tam — a siedźże tu!
Tryb rozkazujący: „u”!

D. Tryb rozkazujący „u”!

N. Gdyby był śnieg i mróz
Jechałby na płozach wóz.

- Warunkowych trybów mus
 Kończyć się zawsze na „us”.
- D. Trudno jeŝli taki mus
 Kończy się ten tryb na „us”.
- N. Ot — i juŝ po czasowniku.
 Będzie koniec z gramatyką.
 Przysłóweczki: dobrze, źle,
 Na pytaniet jak — i gdzie?
 Mają na koniuszku „e”!
- D. Na pytanie jak — i gdzie?
 Mają na koniuszku „e”.
- N. Teraz — gđyście juŝ poznały
 Gramatyczkę — działki małe.
 Powtarzajcie za mną razem,
 Ale wyraz za wyrazem:
- D. z N.
 Esperanta vera homo
 Ne demandas pri la nomo,
 Ĉiujn amas en la koro.
 Ne ekzistas hom-koloro,
 Homa raso, homa sekso,
 Ĉiujn laŭ la kor'-amplekso,
 Ĉiujn laŭ la kor' flamanta
 Amas homo esperanta.
- N. (sama)
 Homo vere esperanta!
 (kurtyna)

Józef Toczyski

Kvazaŭ ga'e flugetanta,
 multkolora papili',
 kun florkrono sur la kapo,
 tra la vivo flirtas vi.
 Kie vi preterpaŝadas
 tuj eksonas birda hor'
 kaj kapsignas la floretoj
 ĉarme ĉe via honor'.

En rigardo via, varma
 kiel hela sunobril',
 sur ebena via frunto
 kuŝas paca kortrankvil'.
 Ne jam vundis vin amara,
 senkompata elreviĝ';
 ĉirkaŭ via bus' vidiĝas
 ne jam sulk' de malfeliĉ'.

Longe daŭru via revo,
 senmalica vi, infan',
 kiu povas porti vian
 tuŝan mondon sur la man'.
 Gardu viajn iluziojn
 pri la vivo ka' la am',
 ne bruliĝu la flugilojn,
 papili', al lampoflam'.

Jan van Schoor.

PROTOKOLO DE KUNSIDO DE U. E. A. — KOMITATO EN VIENO JE LA 15-a DE AŬGUSTO 1936

ĈEESTIS: La Prezidanto (Gen. L. Bastien), P. W. Baas (Nederlando), O. Buiwid (Polujo), I.R.G. Isbrücker (Nederlando), P. Kempeneers (Belgujo), E. Malmgren (Svedujo), A. C. Oliver (Britujo), P. Petit (Francujo) kaj J. R. Scherer (Usono).

La Ĉeestantaj Komitatanoj de U.E.A., post lego:

- 1) de la letero de S-ro Bouvier, de la 30-a de julio 1936. kiu antaŭvidigas esperon de akordiĝo pri la nuna proceso.
- 2) de la letero de S-ro Bouvier, de la 13-a de aŭgusto 1936. kiu malaperigas tiun esperon kaj montras, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la proceson ĝis la fino,

konsiderante, ke tiu decido de la protestintoj malhelpas la translokigon de la oficejo de U. E. A. al Londono dum pluraj monatoj; ke tio iĝas neebla la komencon de la laboro por la venonta jaro kaj eĉ ĉiun seriozan taskon dum pluraj mo-

natoj; ke en la nunaj cirkonstancoj tio signifas la morton de U.E.A.

komisias sian Prezidanton por fari tuj ĉe S-ro Stettler kaj ĉe la protestintoj lastan klopodon por ke tiuj ĉi rezignu sian agadon kaj por eviti la baldaŭ timotan katastrofon.

En okazo de malsukceso aŭ de netujia sukceso decidas, ke la Landaj Asocioj, respektive la Komitatanoj, estos petitaj, ke ili tuj ekŝiĝu el U. E. A. kaj fondu novan Asocion sidantaŭ en Londono, ne akceptas la ekŝiĝon de S-ro Goldsmith kiel Direktoro, kaj decidas, ke li estos proponita kiel Generala Sekretario de la nova asocio.

Komisias sian Prezidanton kaj sian Direktoron por pristudi post konsiliĝo kun juristoj, la demandojn, kiujn sekvigas tiu rezolucio: provizora statuto, forlaso de la posedajo de U. E. A., ktp.

Pri la nuna Proceso:

En la dirita okazo de malsukceso, decidas, ke proceso, kiu ne plu interesos la novan Asocion, estos forlasita, post konsiliĝo kun juristoj.

SILENTO

Estis jam nokto, kiam ili silentaj aliris al la ĝardenpordeto. Ĉio estis jam dirita. Li definitive konvinkigis, ke ŝi nur lirtis kun li por kontentigi sian vantecojn, ke ne estis amo, nur mensogo kaj ke ŝi ludis kun li, kiel kato kun muso.

La silento premis, kiel premis ankaŭ la aero, saturita de dumtagaj elspiraĵoj kaj varmigita de la julia suno. Estis sufoko, pezo... Kaj kiel la ĉielo graveda per elektro estis jen... jen..., akusonta per fulmo kaj tondro, tiel ankaŭ ilia silento kaŝis en si ion timigan kaj ne estis plue tolerebla.

— Se la dento doloras kaj ne estas kuracebla oni devas ĝin elŝiri... — obtuze eksonis la vortoj tra la silento — adiaŭ!

Li abrupte kisis ŝian manon kaj rapide foriris.

Ŝi volis lin haltigi..., ion diri... sed estis jam malfrue.

Li malaperis kunfandinte kun la mallumo de l' nokto.

I. Dratwer.

GRATULO.

Societo „Esperanto“ en Kraków esprimas al sia longjara kaj meritplena animo S-ino Nusia Bertig-Daltnier siajn plej korajn bondezirojn okaze de ŝia edziniĝo, okazinta la 4. de aŭgusto 1936,

Ważne dla szkół i samouków! ZNIŻKA CENY

Już ukazało się II-gie wydanie aprobowanego przez Ministerstwo W. R. i O. P. podręcznika esperanckiego pt. „LEKCJE JEZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO” — w opracowaniu **prof. Sygnarskiego** z przedmową prof. uniw. **dra Bujwida**. Cena podręcznika, zupełnie zmienionego, znacznie rozszerzonego i zaopatrzonego w dwa słowniczki — tylko 1'60 zł., przesyłka 25 gr. Do uabycia w Administracji „**Pola Esperantisto**“, Kraków, Lubiec 34. (Konto PKO 406.660) lub w „**Naukowem Kole Esperanckiem**“, Bydgoszcz, plac Wolności 9. (Konto PKO 141.787).

R E C E N Z O J

M. ROLLET DE L' ISLE. Skribado kaj Prononcado de la personaj kaj lokaj nomoj. 24-paĝa broŝuro, eldonita en Parizo.

Sur la titolopaĝo presigis la aŭtoro kiel moton interalie jenan frazon de Zamenhof: „En la lingvo internacia oni devas cbei sole nur la logikon...“

Sed diskutante pri la skribado de la personaj kaj lokaj nomoj en Esperanto, ni povas kun sama praveco citi la sekvantan opinion, kiun esprimis la Majstro en sia „Respondo 47“ publikigita en la Oficiala Gazeto, III. 1911. p. 291. pri la nomoj de landoj. Jen ĝi: „Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco“.

Kial mi aludas tiun frazon? Ĉar sro M. Rollet de l' Isle pledas es sia verketo por absoluta logikeco en la skribado kaj prononcado de nomoj, asertante, ke ĝis nun la esperantistoj posedas nenun tiurilatan regulon. La aŭtoro starigas enaĵ du principajn regulojn:

I. Skribado. Ĉiuj personaj, lokaj, antikvaj kaj modernaj nomoj estas skribataj laŭ sia originala formo, t. e. laŭ sia

nacilingva ortografio per la esperanta alfabeto.

II. Prononcado: La nomoj, skribataj kiel ĵus dirite, estas prononcataj kiel esperantaj vortoj aŭ laŭ alia prononcado konata de la interparolantoj, ekzemple la originala“.

La strikta aplikado de la suprecitaj reguloj en la praktiko devas kaŭzi se ne konfuzon, do almenaŭ sufiĉe gravajn malfacilaĵojn, kiujn cetere la aŭtoro ŝajnas antaŭvidi, ĉar li mem malsimpligas siajn regulojn per aldono de parte esceptaj parte suplementaj reguletoj.

La reguloj pri ortografio de personaj kaj geografiaj nomoj fiksataj de A. Zakrzewski en lia gramatiko de la lingvo Esperanto (Varsovio 1907) estas pli alkonformigitaj al bezonoj de praktika vivo, ĉar ili ne tro malproksimiĝas de metodoj uzataj en la naciaj lingvoj.

Jen liaj reguloj:

a) personaj kaj geografiaj nomoj, devenantaj el lingvoj, kiuj uzas latinan alfabeton, estu skribataj laŭeble en la sama formo, kiun ili havas en propraj lingvoj. (ekz. Bordeaux, Zürich, Sheffield,

Praha, Lafontaine, Schiller, Byron, Vrchlicky...)

b) personaj kaj lokaj nomoj kiuj en siaj originalaj lingvoj estas skribataj per alfabeto alia ol latina: serba, rusa, bulgara, hebrea, japana k. t. p. estu esprimataj laŭeble fonetike helpe de esperanta alfabeto (ekz. Ŝčavinskij, Voronĉej, Ruščuk, Erec, Fujijama...)

c) nomoj de kelkaj pli konataj personoj kaj lokoj de kategorio a) estas prononcataj kaj skribataj kiel esperantaj vortoj (ekz. Vaŝingtono, Homero, Mahometo, Nerono, Parizo, Londono, Genevo, Varsovio...) La samo koncernas la mondpartojn: Eŭropo, Azio, Aŭstralio; la landnomojn: Francujo, Polujo, Hispanujo...

Se ni komparas la regulojn proponatajn de sro Rollet de l' Isle kun la principoj, fiksitaj de Zakrzewski, ni sentas nin pli altirataj de tiuj ĉi lastaj ĉar „komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco“...

Finante la recenzon, mi devas ankoraŭ atentigi la aŭtoron pri neĝusta uzo de la adjektivoj „Atlantika“ kaj „Arktika“ sur la paĝo 22. Preferinda estas la formo „Atlanta“ des pli, ke ĝi estas Zamenhofa vorto, (vidu Fund. Krest. p. 205. lin. 29.) kaj „Arkta“, kiun ni trovas en la vortaro de Kabe.

Napoleono.

LIV SANDBERG. Norvega Kantareto. Eldonita de Norvega Esperantista Ligo. Oslo 1936.

La kantareto enhavas 35 poeziaĵojn, sed ne ĉiuj pravigas la titolon, ĉar 11 kantoj havas nenion komunan kun la norvega literaturo. Inter tiuj lastaj ni trovas esperantajn, svedajn, danan, hungaran k. a. kantojn. La norvegaĵ kantoj havas ian specialan, malfacile difineblan ĉarmon, kaj respegulas bonege la spiriton de norvega popolo.

La tradukoj estas el lingva vidpunkto preskaŭ senriproĉaj.

Napoleono.

DELFI DALMAU. Ilustrita Lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso. Prezo: 1 angla ŝilingo.

Por kompreni la metodon, uzitan de la aŭtoro, oni devas atentigi la noton post la oka leciono, en kiu li turnas sin al la estonta profesoro, gvidonta kurson sur bazo de lia lernolibro. „...Esperanto estas hodiaŭ vivanta lingvo. Oni devas lerni kaj lernigi ĝin, unue, praktike, kiel la gepatroj lernigas la infanojn paroli.

Post la baza kaj vivanta parolata lingvo, venu la gramatiko kaj la vortaro...“

Jen la ideoj de la aŭtoro pri plej ĝusta sistemo de instruado de nia lingvo. Ili estas nek novaj nek originalaj, kaj la unua ilustrita lernolibro de Esperanto aperis ankoraŭ antaŭ 25 jaroj. Verkis ĝin Th. Cart. kaj eldonis sub la titolo „Instruado de Esperanto per bildaro“. (Paris. Presa Esperantista Societo).

La lingvo de s-ro Dalmau estas preskaŭ perfekta, kaj la stilo povus esti nomata modela, se en la verketo ne troviĝus kelkaj malĝataĵoj kaj neĝustaj. Mi ne povas citi la rimarkitajn malkorektaĵojn laŭ la paĝoj, ĉar la aŭtoro forĝis bedaŭrinde numeri la paĝojn...

Jen la listo de neĝustaj:

Unua leciono: La pronomo „kiu“, la numeralon „unu“ kaj la artikolon difinitan „la“ citas la aŭtoro en la rubriko „adjektivoj“.

Kvara leciono: „Hieraŭ mian amikon Petro“. Devas esti „Petron“.

Kvina leciono: „La krajono kaj la plumo taŭgas por skribi“. Preferinda estas la esprimo „por skribado“.

Oka leciono: „Kaj nun ili eĉ defendas, ke virinoj devas labori“. Anstataŭ „defendas“ devas esti „pledas“.

Naŭa leciono: (sur „u“ de la vorto „naŭa“ mankas bedaŭrinde supersigno). „Aliaj metaloj estas ŝtalo, kupro, plumbo, lado...“ Lado ne estas metalo, sed metalaĵo...

Deka leciono: „Por rakonto aŭ pridiro“. Anstataŭ „pridiro“ pli ĝusta estus la vorto „preparolo“.

Dek-dua leciono: „Dro Zamenhof, kiu estis genia animo...“ La aŭtoro konfuzis la ideon „animo“ kun la koncepto „spirito“.

Antaŭlasta paĝo: la esp. vorton „kontraŭe“ tradukas la aŭtoro per „tandis“ (france) kaj „while“ (angle). La traduko estas erara, ĉar „kontraŭe“, kiu en Esperanto havas la sencon de „en kontraŭa maniero“, signifas en franca lingvo „au contraire“ kaj en la angla „on the contrary“.

Lasta paĝo: „Mendo: estas servotaj...“ Eraro el gramatika kaj stila vidpunktoj, ĉar devas esti „Mendoj estos efektivaĵoj (plenumataj)...“

„Gvido por la profesoro“. Preferinda estas la esprimo „indikoj“ aŭ „instrukcio“.

„Ruĝo plumo“ — preseraro. Devas esti „ruĝa“.

„Fonetikaj privataĵoj“... Certe volis la aŭtoro diri „apartaĵoj“.

Napoleono.

NOVAJOJ EL ESPERANTUJO

Laŭ iniciato de Esperanta Brazila Ligo, kies prezidanto estas s-ro **Alberto Conto Fernandes** kaj sekretario **Dro Luiz Porto Carreiro Netto**, okazos la 10. de novembro 1936. la 9-a Brazila E-Kongreso. La komitato de la Kongreso invitis prof. **Dron Odo Bujwid** el Kraków kaj turnis sin samtempe al Pola Ministerio

de Eksteraj Aferoj kun la peto plifaciligi al la profesoro la partoprenon en la Kongreso.

Sekvante la inviton de brazilaj samideanoj prof. O. Bujwid forvojaĝis Brazilon, ensipiĝinte la 20. de oktobro k. j. en Gdynia.

NOVA VENKO KAJ NOVA KONKURSO

Fremdultrafika Asocio de Oslo (ĉefurbo de Norveglando) ĵus konsentis aranĝi internacian konkurson, similan al tiu aranĝita de la nederlanda unuiĝo A. N. V. V.:

En la semajna organo de la Asocio, „Oslo denne uke“ (Oslo dum tiu ĉi semajno) estis en la unua semajno de ok-

los 4-persona komitato, en kiu la Oslo-gazetaro havas reprezentanton. Entute la konkurso forte antaŭenpuŝos la Esp.-movadon en Norveglando.

Ĉiu esperantisto partoprenu! Ni montru al tiu grava Fremdultrafika Asocio ke Esperanto utilas!



Nacia Teatro en Oslo.

tobro publikigitaj 3. Esp.-lingvaj artikoloj pri Oslo, el kiuj oni devas — ĝis la 31. januaro — ion traduki en nacian lin-

UEA-delegitoj, gazetredakcioj, Esp.-grupoj kaj unuopaj esperantistoj: Jam nun petu la konkurson numeron (kun ar-

ĝvon kaj aperigi en kiel eble plej multaj gazetoj.

La Asocio disponigas 5 valorajn premiojn.

De la koncerna numero de „Oslo denne uke” estos presataj, krom la ordinara eldonkvanto, 8.000. ekz. por dissendo okaze de la konkurso. La rezultoj kontro-

likoloj kaj kondiĉoj de la Asocio: REI-SETRAFIKKFORENINGEN, Egertorvet, Oslo, Norveglando. Indiku kiom da ekzempleroj vi bezonas. Ni ekspedos unue al la unuaj petintoj.

Ĉiuj Esperanto-gazetoj estas pelataj repres:

SOLVITA PROBLEMO.

Pri kio ne kuraĝis sonĝi la unuaj pioniroj de Esperanto, fariĝis nun realaĵo. Pli kaj pli laŭtiĝas la voĉoj en diversaj landoj: „Esperanto en la lernejoj”. La esperantistaro komencas kuraĝe sieĝi la fermitajn pordojn de la lernejoj, por doni al sia posteularo unu komprenilon por internaciaj rilatoj, indan je nia moderna epoko, kaj forigi de ĝia ŝultro la malbenitan ŝarĝon, kiun alportas lernado de multaj lingvoj. En kelkaj landoj oni ampridebatis la eblon eldoni lernolibreton por infanoj kaj verki porinfanan literaturon. Fronte de tiuj ĉi klopodoj staris la Federacio de lab. esp. en la regiono de la nederlanda lingvo, kiu pasiĝjare kunigis en siaj kursoj pli ol 500 infanojn kaj laŭ la perspektivo en la nuna sezono ĝi atingos verŝajne duoblan nombron da junaj adeptoj por Esperanto. La Federacio, metita jam nunjare antaŭ tuja solvo de la problemo, klopodis trovi la plej praktikan vojon kaj atentinte ĉe (fo ne nur nederlandan, sed ĉiulandan bezonon je tiu ĉi kampo, ĝi prezentas al la esperantistaro lernolibron por infanoj, verkitan de instruistino A. Rebers kaj ankaŭ internacie uzeblan. La unua volumo de tiu ĉi ilustrita lernolibro enhavas 40 lecionojn kaj aperis je la 1-a de septembro en la presita infangazeto „La Vojo”, ĉiumonate kun 4 lecionoj.

Al eksterlandaj instruantoj la Federacio disponigas senpage esperantan gvidilon kaj esp. tradukon de la nederlandlingvaj ekzercoj, por ke oni povu traduki ilin en sian gepatran lingvon.

La infangazeto „La Vojo” havas por instruantoj duoblan valoron, ĉar krom la lecionoj ĝi prezentas internacian legajon por komencantoj kaj progresintoj.

Abonprezo por tuta jaro (12 n-roj, po 8 pĝ) kostas nur f. O. 65 aŭ 5 internaciaj respondkuponoj. Por 1. n-ro, oni sen-

du 1 respondkupono. Adreso por abono (kun antaŭpago): Postbus W. 6, Amsterdam-West, Nederlando.

ESPERANTA KLUBO LJUBLJANA.

Ljubljana, aŭgusto 1936.

Estimata samideano!

La fremdultrafika sekcio de Ljubljana komunumo ĵus eldonis novan prospekton esperantlingvan pri la urbo. Estas tio jam la tria tiurilata oficiala eldonaĵo. Ĉe la prospekto kunlaboris la anoj de nia klubo, kiu tradukis ĝin.

Tiu nova prospekto ne estos dissendata laŭ la ĝisnuna maniero, pere de nia klubo, sed oni ricevos ĝin direkte de la eldonisto mem.

Gesamideanoj, montru, ke Vin interesas tiu oficiala rekonno de Esperanto. Skribu karton aŭ leteron kaj petu la plej novan prospekton de Ljubljana.

Adresu la korespondaĵojn al:

„Tu skoprometni svet mesta Ljubljane,

LJUBLJANA.

Auerspergova palaĉa. Jugoslavio.

Aŭtaŭdankon, samideanajn salutojn!

Esperantistoj de Ljubljana.

Por la esperantistaj radio-amatoroj, ekzistas speciala gazeto „Internacia S.O.S. Bulleno”. Ĝi aperas ĉiumonate kaj dum vintro ĉiadusemajne. Ĝi anoncis la programojn de ĉiuj esperantistaj radio-elsendoj tag-po-tage.

Oni povas peti senpagan specimennon de la redaktanto ALGLAVE M., 150. rue Crote-Voye, BLANC-MISSERON, Nord, Francujo.

JARABONO: Francujo kaj landoj aliĝintaj al Interkonsento de Stockholm: 9 fr. fk. aŭ 6 respondkuponoj.

Aliaj landoj: 12 fr. fk. aŭ 9 respondkuponoj.

Nia gazeto estos senpage sendita al ĉiuj, kiuj abonigos kvar s-anojn al nia or-

gano. Do, se oni varbus kvin novajn legantojn, oni pagus nur al ni kvar abonojn kaj la bulteno estos sendita al la kvin semideanoj.

Komprenible informoj pri la esperantistaj radiodissendoj estas ĉiam plezure ricevataj.

Anoncoj estas akceptataj ankaŭ volonte.

VARBU LEGANTOJN AL „INTERNACIA S. O. S. BULTENO“!

La esperantisto havos la radiodissendon, kiuj ili meritos!

NOVA JAPANA JURNALO EN ESPERANTO.

(ap.) Tokio PAT. Komencis tie ĉi aperadi nova jurnalo literatura-sciencia en la esperanta lingvo, sub titolo: „Orienta Kulturo“, eldonata de Societo de Orienta Kulturo. La interesa enhavo de la unua numero konsistas el artikoloj: „Origino de Ĉina Civilizacio“, verkita de la fama verkisto japana-esperanta Kijo Cujuki, „Skizo pri Aino-Literaturo“, verkita de Masami Igarasi, kaj artikolo pri masko uzataj en malnovjapanaj dramoj, verkita de Fuk. Tamura. La artikolo estas ilustrita per 12. fotoj, maskoj.

Adreso de la Redakcio: Societo de Orienta Kulturo, Tokio, Komagome Dzakaka 228.

(Esperanta Oficejo Gazetara)

La Esperanta Oficejo Gazetara, post mallonga tempo komencos aperigadi konstantan esperantlingvan bultenon gazetaran por la esperanta gazetaro en la tuta mondo. Redakcioj kaj jurnalistoj, kiuj deziras ricevi la bultenon, estas petataj ĝin ekpostuli.

LA BULTENO ESTOS SENDATA TUTE SENPAGE.

La Esperanta Oficejo Gazetara sin turnas al ĉiuj esperantaj gazetoj, jurnalistoj kaj aliaj volontuloj pri alsendo de esperantaj gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj same pri alsendo de novaĵoj pri la esperanta movado.

La Esperanta Oficejo Gazetara liveras senpage materialon pri Polujo kaj la esperanta movado en Polujo.

Adreso: Antoni Pisarski-Woydakowski, Direktoro de la Esperanta Oficejo Gazetara, Warszawa I., poŝtkesto 408, P o l l a n d o.

LUDMILA JEVSEJEVA.

K I A L ?

Al pasintec' nin ligas rememoroj,
En travivaĵoj diamantas ĉarm';
Ne plu vualas okulparon larm',
Jam forgesita maljustec', doloroj.

En hodiaŭo ni senĉapaj iras,
En pensoloroj floras iluzi',
Fabelan landon naskas fantazi'...
Sed kial ni realon ne admiras?

Riga, 1936.

**ABONU MEM KAJ VARBU POR
„POLA ESPERANTISTO“! VI LEGOS
ĈIAM INTERESAJN NOVAJOJN PRI
LA LANDO DE JUBILEA KONGRESO!**

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazać rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.600.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societajoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—